

La Suda Kruro

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penceoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 29. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Novembro, 1922.

THE LEAGUE OF NATIONS AND ESPERANTO.

The report of the general secretariat to the Third Assembly, as amended and adopted by the Fifth Committee of the Assembly on the 14th September last, has been issued.

The document summarises the information gathered by the secretariat and presents many opinions in favour of Esperanto. It is not in favour of listening to theorists, and says, "... it is to the interest of the world to have one auxiliary language, not two or three, and, from a practical point of view there is less risk in taking one of which some experience has been gained, and which has already attained some tradition and a guarantee of lasting unity ... Esperanto is certainly the most widely spoken artificial language in universal congresses. ... This makes it a living language—a characteristic not possessed by any of the systems which are only written and not spoken. ... This language can be of very great service, thanks to its practical organisation and to the fact that it has spread to most countries of the world. ... Language is a great force, and the League of Nations has every reason to watch with particular interest the progress of the Esperanto movement, which, should it become more widespread, may one day lead to great results

from the point of view of the moral unity of the world."

The Committee resolved, "That questions relating to the teaching of Esperanto be referred to the Committee on Intellectual Co-operation, in order that that Committee may give its opinion on the various aspects of an international auxiliary language."

ESPERANTO IN LATVIA.

The Latvian daily, "Latvijas Sargs," published in Riga, and circulating chiefly among business men and farmers, was the first and still is the only Latvian paper which has a portion of its contents printed in Esperanto every day. It expresses itself as willing to publish articles about Australia and to furnish information regarding Latvia. The monthly journal of the Ministry of Education has an Esperanto column, and another publication (issued by a society for advancing Latvian culture), also publishes news of the movement in every issue.

A party of twenty Esperantists, of fourteen different nationalities, returning from the Finland Congress, was granted an audience by the President of the Republic. Sino. Cense, of Paris, addressing the President in Esperanto, said that those present rejoiced with Latvia in her liberation,

kunsidoj de la diversaj oficialaj komitatoj aparte aŭ kune.

La Institucioj nomataj "oficialaj" estas:

la Lingva Komitato (L.K.) kaj ĝia Akademio,

la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.),

la Universala Esperanto Asocio kun sia Komitato (UEA),

la Centra Esperanto-Komitato (C. K.) kun sia Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.).

V.

Krom la Universalaj Kongresoj povos okazi periode oficialaj teknikaj konferencoj, laŭ decido de la Centra Komitato, kiu tamen ne zorgos pri konferencoj politikaj aŭ religiaj.

VI.

La oficialaj komunikoj de la oficialaj institucioj estas publikigitaj pere de Esperantistaj gazetoj.

La oficialaj dokumentoj kaj raportoj estas publikigitaj per zorgo de la Centra Komitato en Oficiala Dokumentaro laŭ siaj nunaj formatoj.

La Kongreso aprobis la jenajn resoluciojn—

"La Kongreso, por faciligi la tujan formadon de la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj petas s-ro. Generalon Sebert kaj s-ro. Chavet, ke ili bonvolu tuj funkcii kiel provizoraj Prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Reprezentantaro, ĝis momento kiam ĝi mem estos fiksinta sian estraron."

"La nuna Komisiono pri Ĝenerala Organizo bonvolu plenumi la oficon de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita."

"La Kongreso petas la Centran Komitaton ke ĝi zorge revizu kiel eble plej baldaŭ la antaŭajn regularojn pri organizaj aferoj, por ke ili akordiĝu kun la akceptita interkonsento."

THE NEW ORGANISATION—

KONSTANTA REPRESENTARO.

General Sebert, under date 12th September, issued a circular to all National Esperanto Societies pointing out that the XIVth Congress had requested him to act as provisional president of the Konstanta Reprezentantaro of National Societies, and to place the new institution on a working basis. He points out that notwithstanding his age and the unsatisfactory state of his health he accepted the task in the hope of rendering service to the Esperanto movement. He seeks information regarding the number of members of the various societies, including their affiliated groups, and asks for an opinion concerning the proposal that every national society should pay for each member—and affiliated member—as a subscription to the Konstanta Reprezentantaro a sum equal to 10 per cent. of a member's subscription to the U.E.A.

It is to be hoped that this matter will receive thorough and prompt attention from every Esperanto Society.

The circular itself is a striking testimony of the necessity for some change being made in our official institutions. Emanating from the Central Esperantist Office in Paris this circular is an almost illegible production of some mimeographic process. One would have thought that for an important matter like this, submitted to people of every nation, money to print the circular in an attractive manner would have been forthcoming. Furthermore, the annexed text of the resolutions agreed to in Helsingfors is reprinted from a French Esperanto paper, and is accompanied by an article IN FRENCH referring to the Congress.

If the head and front of our movement cannot—or does not—express itself in Esperanto, the uninformed are likely to draw wrong inferences.

All future documents and communications issued from the Central office on behalf of the Konstanta Reprezentantaro should be printed, and should undoubtedly be wholly in Esperanto.

Kiu sendas al s-ro. Henriko Her, Rusujo, Donbass, "Bahmuto," Rostovskaja 2. dek da diversaj esperantaj ĵurnaloj tiu ricevas 60 sovietajn p.m. bonajn.

AMERIKA LEGENDO.

Unue, mi devas konatigi al vi Pauline Johnson, la filino de ĉefo inter la ruĝhaŭtuloj. Estas al ŝi, ke mi ŝuldas por la traduko el la nacia lingvo en la anglan.

La patrino de Pauline estis anglino, kiu naskiĝis ĉe Bristol, Anglujo. Antaŭ ol Pauline havis dekdu jarojn ŝi legis la plej famajn poemojn en la angla lingvo. Poste, kiam ŝi pli maturiĝis ŝi verkis por la literaturaj gazetoj en Ameriko kaj en Anglujo. Pro siaj poemoj ŝi fariĝis bone konata, kaj la sekvanta paŝo de ŝia kariero estis kiam ŝi aperis kiel deklamistino. Poste ŝi vizitis Anglujon, kie ŝi faris multajn prezentadojn. Ŝi reirante vizitis Kanadon kaj faris sian unuan vojaĝon al la pacifika marbordo. Ŝi poste transiris la "Rocky" montaron ne malpli ol deknau fojojn.

Pauline mortis en Vancouver, la 7 an de marto, 1913. Por plenumi ŝian lastan peton, oni interigis ŝin en Stanley Parko, ĉe loko videbla kaj aŭdebla de "Siwash Rock." Estis apud tiu ĉi roko, ke ŝi ofte sidis kiam ŝi verkis, kaj mia unua legendo estas pri "Siwash Rock."

Ĉe loko proksima al la komenco de tiu parto de la golfo Vancouvera, kie, pro la mallarĝa distanco inter la du flankoj de la golfo, ĝi nomiĝis "The Narrows" (La Mallarĝiĝo), oni povas vidi grandan, majestatan rokon. Unu tagon tuj antaŭ la sunleviĝo, Pauline kaj ĉefo kiu estis bona amiko de ŝi, pasis la rokon en padelkanoto. La ĉefo levis la padelon kaj per ĝi montris la rokon. Al Pauline li diris, — Ĉu vi aŭdis la historieton pri tiu roko? — Ŝi kapneis, ĉar ŝi sciis, ke li preferis la senparolan respondon, kiam li sentis la deziron rakonti legendon. — Ĉu vi pensas, ke ĝi staras, kvazaŭ viro—li diris. —Jes, ĝi similas noblan, honestan militiston—Pauline respondis.

—Ĝi ja estas viro—li diris—kaj militisto ankaŭ. Ĝi estas viro kiu batalas por ĉio, kio estas nobla kaj honesta.

—Kaj kio, vi pensas, estas ĉio, kio estas nobla kaj honesta, ŝi demandis. La respondo estis por ŝi granda surprizo.

—Ĝi estas "Pura Patreco."

Tiam la ĉefo komencis la legendon. —Estis antaŭ miloj da jaroj, ke bela

knaba ĉefo vojaĝis en sia padelkanoto al li pli norda marbordo por la timo knabino, kiun li poste hejmen kondukis kiel edzinon. Kvankam li estis nova knabo, la juna ĉefo pruvis, ke li estas bona militisto, sentima ĉasisto, kaj honesta, kuraĝa homo. Lia gento amas lin, liaj malamikoj lin respektis, kaj la malveruloj kaj la malkuraĝaj timiduloj lin. La kutimoj kaj la tradicioj de liaj prapatroj estis lia religio, kaj li diris kaj konsilo de la maljunuloj estis lia kredo. Li kantis siajn militkantojn, dancis siajn militdancojn, mortigis siajn malamikojn, sed al lia eta knabin-edzino el la nordo, li agis sarkasme kiel al la patrino, ĉar ĉu ŝi ne estus la patrino de lia militista filo?

—La jaro forflugis, semajnoj fariĝis monatoj, vintro fariĝis printempo, kaj en unu bela somera mateno, ĉe la tagiĝo, li vekigis per la voko de la kano edzineto. Ŝi ridetante staris ĉe lia flanko. "Okazos hodiaŭ," ŝi diris, fierde. Li saltis de la kanapo el vulpfelo kaj rigardis la venontan tagon. Li prenis ŝin tre ĝentile per la mano kaj ŝi kondukis tra sovaĝejo al la marbordo. "Mi devas naĝi," li diris al ŝi. "Mi ankaŭ devas naĝi," ŝi ridete respondis. Ĉar al li la antikva moro estis leŝa, la moro, ke la gepatroj de la venonta infano devas naĝi ĝis siaj korpoj estas tiel puraj ke sovaĝa besto ne povas flari ilian proksimecon. Se la sovaĝaj kreitaĵoj de la arbaro ne timas ilin, tiam, kaj nur tiam, ili taŭgas por esti gepatroj, kaj flari homon estas timigilo por ĉiuj sovaĝaj bestoj.

La du sin ĵetis en la akvon samtempe kiel la griza tagiĝo alvenis, kaj la arbaro vekigis al la vivo de nova gaja tago. Poste li kondukis ŝin marborde kaj ridetante ŝi foriris sub granda arbo. —Mi devas esti sola—ŝi diris,—sed venu al mi je la sunleviĝo, tiam vi ne trovos min sola.—Li ankaŭ ridetis, kaj ree subakvigis en la maron.

Li devas naĝi, naĝi, naĝi dum tiu ĉi horo kiam patreco alvenos al li. Estis la moro, ke li devas esti pura, purega, por ke, kiam lia infano venos en la mondon, ĝi havos oportunon pure vivi sian propran vivon. Se li ne naĝis horo post horo lia infano venus al malpura patro. Li ne devas ĝin malhelpi per sia malpureco. Dum li naĝis, alvenis padelkanoto portante kvar virojn. Tiu

ĉi viroj estis gigantoj, kiuj kirligis la akvon per la padeloj. —For de nia vojo—ili kriis. Kvankam ili estis gigantoj li ridis, kaj respondis, ke li ne por ili ĉesus la naĝadon. —Sed vi devas ĉesi—ili postulis. —Ni estas la viroj (agentoj) de la Sagalie Tyee, (Dio), kaj ni postulas, ke vi iru teren for de nia vojo.

Li ĉesis naĝi kaj levante la kapon spitis ilin. —Mi ne haltos, nek mi iros teren—li diris, kaj ree komencis naĝi. —Ĉu vi kuraĝas spiti nin—ili kriis—ni, la agentoj de la Sagalie Tyee! Ni povas fari vin aŭ fiŝo, aŭ arbo, aŭ ŝtono pro tiu ĉi ago. Ĉu vi kuraĝas malobei al la Granda Sagalie Tyee? —Mi kuraĝas ĉion por la pureco de mia venonta infano. Mi spitas eĉ la Sagalie Tyee, sed mia infano devas komenci per pura vivo.

La kvar viroj estis mirigitaj. Ili lumis siajn pipojn, kaj interkonsiliĝis. Neniam antaŭe iu spitis ilin, la agentojn de la Sagalie Tyee. Nun pro eta nenaskita infano iu ilin ignoris, malobeis, preskaŭ malestimis! La supersticio estis, ke se ilia padelkanoto, aŭ eĉ iliaj padeloj tuŝus homon tuj iliaj mirindaj povoj forlasus ilin. La bela juna ĉefa naĝis trans la vojo. Ili ne kuraĝis daŭrigi la vojaĝon, ĉar se ili lin tuŝus ili fariĝus same kiel aliaj homoj. Dum ili ankoraŭ konsiliĝis, venis el la arbaro mallaŭta krio. Ili aŭskultis kaj la juna ĉefa ĉesis naĝi kaj ankaŭ aŭskultis. Ree ili aŭdis la mallaŭtan krimon. Estis la krio de infaneto.

—Tiam unu el la kvar viroj, tiu, kiu direktis la boaton, la plej forta kaj la plej alta el ĉiuj, staris rekte kaj etendante siajn brakojn en direkto de la suno li kantis, ne malbenon al la juna ĉefa pro malobeemeco, sed promeso de eternaj tagoj kaj libereco de la morto.

—Ĉar vi spitis ĉion, ni promesas tion ĉi—li kantis—Vi spitis tion, kio malhelpis la oportunon por pura vivo de via infano; vi vivis kiel vi deziras ke via filo vivu; vi spitis nin kiam ni volis haltigi vian naĝadon, kaj malhelpus la estontecon de via infano. Vi pensis pri la estonteco de via infano antaŭ ĉio, kaj pro tiu ĉi la Sagalie Tyee ordonas nin fariĝi vin por ĉiam ekzemplo por via gento. Vi neniam mortos, sed vi staros dum la venontaj miloj da jaroj kie ĉiuj okuloj vin povos vidi. Vi vivos, vivos kiel nedetruenda monumento al pura patreco.

—La kvar viroj levis la padelojn, kaj le bela juna ĉefa naĝis borden. Kiam liaj piedoj tuŝis la lokon kie la tero kaj la maro kuniĝas li fariĝis ŝtono. Tiam la kvar viroj diris,—La edzino kaj infano devas ĉiam esti proksimaj al li. Ili ne mortos sed ankaŭ vivos, kaj ili ankaŭ fariĝos ŝtonoj.

—Se vi penetras la arbaron apud "Siwash Rock" vi trovos grandan ŝtonon kaj apud ĝi malgrandan. Ili estas la timema edzineto el la nordo kun ŝia horaĝa infaneto apud ŝi.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Estos ekzameno por B.E.A. diplomo, ĉe Melburna sekcio de la A.E.A., 18 de novembro. Ekzamenotoj sciigu siajn nomojn al la sekretario.

Esperanta koncerto por helpi la kason de la U.E.A. havos lokon la 15 de novembro, ĉe Aŭstralia Preĝejo, strato Russell. Ĉiu, kiu interesiĝas pri Esperanto estas kore invitata.

La Melburna Esperanto Klubo festenos la naskotagon de Doktoro Zamenhof, ĉe la Austral Salon, strato Elizabeth, sabaton, 16 de decembro. Oni kantos, deklamos kaj ludos drameton. Ĉiu Esperantisto estos bona, sen enirpago.

Okaze de la reveno de s-ro. Hudson, la Aŭstralazia Esperanto-Asocio nun aranĝas publikan propagandan kunvenon en la Queen's Hall, strato Collins, lundon, 20 de novembro. Samideanoj notu kaj penu havigi la ĉeeston de personoj el oficialaj kaj komercaj rondoj, kiuj povos antaŭenpuŝi nian lingvon, se ili konvinkiĝas pri ĝia utileco.

La Rationalist Association Grupo, kiu kunvenas ĉe la Temperance Hall, aliĝis al la A.E.A.

BOX HILL, V.—Nia fervora samideano, s-o. H. M. Lanyon, antaŭe el Gisborne, kiu nun loĝas ĉe Box Hill, komencis kurson inter la membroj de la A.N.A.

SANDRINGHAM, V.—La ĉi tiea grupo, kiu alprenas la nomon, Marborda Grupo, aliĝis al la A.E.A.

KOROIT, V.—Doktoro F. J. Williams vekis intereson ĉi tie pri Esperanto. Grupo eble fondiĝos. Intertempe, f-ino. Taylor, instruistino, donos informojn al interesuloj.

NIA PROPAGANDISTO EN EŬROPO VENAS HEJMEN.

Kiam nia multvojaĝinta samideano, s-ro. Percy T. B. Hudson, eliris el la rapida vagonaro, en kiu li venis el Sidnejo, finante la lastan porcion de sia longa vojaĝo, li trovis sur la fervoja perono por bonvenigi lin, krom siajn parencojn, la prezidanton, la prezidinton kaj multajn aliajn membrojn de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio. Post koraj vortoj de bonveno la Esperantistoj lasis s-ron Hudson kun siaj parencoj.

Vendredon, 20 de oktobro, s-ro, Hudson vizitis la Melburnan sekcion de la A.E.A. kaj ricevis aklaman bonvenon. Li bonvolis detale paroli pri la notindaĵoj, kiujn li vidis dum sia dek sep monata migrado tra dudek naŭ landoj. Kortuŝa estis lia priskribo de sia foriro el Helsinki post manpremo de s-ino. Zamenhof kaj ricevo de saluto de tiu afabla sinjorino por kuraĝigi la Esperantistojn en lia tre malproksima lando.

Granda nombro de samideanoj kaj amikoj kunvenis ĉe Sargent's Cafe, (Kafejo de Sargent), merkredon, 25 de oktobro, por publike bonvenigi s-ron. Hudson. Prezidis la vic-prezidanto, de la A.E.A. (s-ro C. W. Ballard), kiu profitis el la okazo mallonge klarigi al la neesperantistoj la devenon, progreson kaj nunan staton de Esperanto. Al la vic-prezidinto (s-ro A. R. Cohen), estis donita la honoro proponi la toston de la gasto, kaj li taŭge esprimis la sentojn de dankemo de la Aŭstraliaj Esperantistoj por la servoj faritaj de s-ro Hudson. Li ja faris multon por Esperanto ĝenerale kaj liaj servoj je la diskonigo de Aŭstralio, ĝiaj produktoj kaj eblecoj estas netakseblaj. Krom tiuj, liaj malavaraĵoj donacoj al la biblioteko kaj al la asocia gazeto, "La Suda Kruco," plue karigas lin al ĉiuj.

Post tumultega aklamo, s-ro. Hudson, parolante angle pro la raportis-

toj kaj aliaj neesperantistoj, montri kiel bonaj kaj servemaj estis la samideanoj en kiu ajn loko li renkontis ilin kaj kiel admirinde kaj sufiĉe Esperanto taŭgas kiel komprenigilo en ĉiu lando, kiun li vizitis.

S-ro. Meredith Atkinson diris, ke la vortoj de s-ro. Hudson vekis rememorojn de multaj lokoj, kiujn li mem konas, kaj li plene konsentas kun li, ke Esperanto estas destinita por plenumi gravan rolon kiel interkomprenigilo tra la tuta terglobo. "Estas nenio en la mondo hodiaŭ," li diris, "tiel grava kiel internacia amikeco, kaj estas nenio, kio povus tion stimuli, krom komuna lingvo. Estas rimarkinde, ke kvankam la laboristoj en ĉiuj landoj penas kaj sopiras al internacia frateco, ili ne utiligas la servojn oferatajn de Esperanto, la universala helplingvo. Post funda esploro multe de la plej eminentaj profesoroj en Eŭropo deklaris sin favoraj al Esperanto. Ili submetis ĝin al ĉia provo, kaj ĝi eliris triumfe kaj senvundita."

Intertempe oni mangetis, trinkis kafon kaj babiladis. Ĝuindaj estis kantoj de f-ino. Croft, kaj de s-ro. Keith Cook, deklamo de s-ro. Scott Bennett kaj uverturo de f-ino Harris. kiu ankaŭ estis akompanisto por la kantistoj. La kunveno finiĝis, kiel komenciĝis per kantado de "La Espero."

HERE AND THERE.

At the Women's University of Meiro, Tokio, s-ro M. Ga taught Esperanto during June.

The summer University at Kamiyazawa included a class for Esperanto. S-ro. Ga was the teacher at the special desire of Baron Goto, the President of the University.

At the Tokio Workers' Institute, 80 members, mostly of middle age, and knowing no European language, are enthusiastically learning Esperanto.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

On the occasion of commencing the second term, s-ro. Oĉiai, more than 50 years old, welcomed the visitors in Esperanto. In reporting the incident, "La Revuo Orienta" remarks: "After 2½ months' study of only one hour weekly, an old working man spoke in Esperanto. Is not this a proof of the easiness of the language?"

The spread of Esperanto in the north of Brazil has resulted in the founding of a club to bring together the local Esperantists, of whom there is a very considerable number. The following additional societies have joined the "Brazilia Ligo Esperantis ta": "Nova Samideanaro," Fortaleza; "Cariry Esperanta Asocio," Crato; "Iguatu Esperantistaro," Iguatu, and the "Mossoro Esperanta Klubo."

The students at 17 Tokio Universities, Colleges and Schools, have formed an Esperanto Federation.

SEKCIO POR LA TEKNIKAJ KAJ SCIENCAJ VORTAROJ.

La unua cirkulero sciigas, ke frue en la jaro, 1922, s-ro. d-ro. Corret, pro troa laborado, ĉesis gvidadi la Akademian sektion por sciencaj kaj teknikaj vortoj. Tiam la Akademio komisiis s-ron. Rollet de l'Isle kiel Direktoron de tiu sekcio.

Tiu sekcio nun estas sendependa de la Akademio kaj la Direktoro havas rajton organizi ĝian laboron laŭ siaj propraj ideoj.

Ĉar la sekcio havas nenian agrimedon la Direktoro aranĝis, ke la Internacia Scienca Asocio, nun en formado, helpu la laboradon de la sekcio. Sekve, la cirkuleroj kaj ĝeneralaj oficialaj informoj estos publikigataj en la Scienca Revuo, kiu baldaŭ aperos.

La cirkulero klarigas la metodon de laboro kaj montras la preferindan ordon de la farotaj laboroj. Jen la nuna Stato de la verkaro. Por Astronomio, Matematiko, Fiziko kaj Mekano, la listoj da vortoj estas faritaj, sed la elekto de esperantaj vortoj kaj la redakto de la publikigota teksto estas farotaj.

La Direktoro volas, ke oni laboru en fakoj inter la plej utilaj en la nuna momento.—Senfadena Telegrafo, Aviado kaj Elektrotekniko.

Fine, krom sciencaj vortaroj estus dezirinde, ke oni laboru pri la prak-

tikaj komercaj industriaj, metiaj kaj profesiaj terminaroj.

Ĉe tiu punkto, lertaj Aŭstralianoj povus fari utilan laboron. Ni bezonas unuformajn terminarojn pri niaj bestoj, niaj arboj, niaj plantoj; kaj egale utilaj estus provoj de esperantaj formoj por centoj da esprimoj, kiuj estas necesaj por priskribi la specialajn kondiĉojn de nia lando, de niaj grandaj ŝafpaŝtejoj kaj de okupadoj, kiuj estas sekvataj nur en Aŭstralio.

Ĉiuj studoj pri la verkado de la teknikaj vortaroj oni devas sendi al s-ro. Rollet de l'Isle, 35 Rue de Sommerard, Paris.

IOM PRI SENFADENA TELEFONO.

Per senfadena telefono la homa voĉo nun povas audiĝi trans landon kaj maron po 186000 mejloj ĉiusekunde.

Nuntempe la efika distanca limo de tiu nova komunikaĵa metodo estas kelkaj centoj da mejloj, sed tiuj baldaŭ pligrandiĝos.

En Usono, Britlando kaj aliaj landoj, miloj da personoj interesiĝas pri la nova komunikilo; jam en Usono pli ol miliono da senfadenaj aparatoj nun funkcias en privataj domoj. Vekiĝas tia granda intereso pri senfadenaj aferoj, ke la fabrikistoj de la necesaj aparatoj tute ne povas liveri novajn aparatojn sufiĉe rapide al mendantoj.

Kian signifon senfadenaj aferoj havas por Esperanto? Laŭ mia opinio nenio povas esti pli grava, ĉar nur lingvaj bariloj malhelpas la planan internacian uzadon de senfadena telefono, kaj ĝi povas plene funkcii internacie nur per la helpo de internacia lingvo.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri la estonta uzado de senfadena telefono, konstato la neceson de internacia lingvo, kaj jam en diversaj teknikaj ĵurnaloj la temo estas diskutita. Legante tiujn ĵurnalojn, oni trovas, ke la inĝenieroj kaj specialistoj, kiuj traktis pri la lingvaj malfacilaĵoj, ne scias la faktojn pri jam vivanta lingvo Esperanto. Do, estas la devo de ĉiu Esperantisto propagandi Esperanton inter ĉiuj personoj en sia distrikto, kiuj interesiĝas pri senfadenaj telefonaj aferoj.

—J. Boyd-Anderson, in "Esperanto Triumfonta."

KIAL?

De Frans De Cort.

Kial la okuloj miaj
servas nur por vidi vin—
kaj rigardi emocie
vian ĉarmon, belulin'?

Kial servas lango mia
sole por certigi vin
ĉiam fajre, ke vi estas
mia sola amatin'?

Kial servas lipoj miaj
nur por ĉiam kun kortuŝ'
premi kisojn feliĉegajn
al rozruĝa via buŝ'?

Vin rigardi, enbrakigi,
diri, ke mi amas vin—
tuta vivocelo mia
estas tio, amatin'!

El flandra lingvo Esperantigis

JAN VAN SCHOOR,
en Esperanto Triumfonta.

PIONIRADO EN TINKTUROJ.

La laborado de maljunulino 73 jara, S-ino. Hart, el "Canadian," Ballarat, kredeble kondukos al gravaj ŝanĝoj en la tinktura industrio. Post 30 jara eksperimentado S-ino. Hart sukcesis perfektigi mirindan serion de belaj koloroj ekstraktitaj el vegetaĵo. El la eŭkalipto sole ŝi povas produkti pli ol cent diversajn kolornuancojn, kaj ŝi diras, ke ŝi nur ektuŝis la eblecojn de la aŭstralia vegeta ĵaro. La enkonduko de anilinaj tinkturoj efektive forpelis la vegetaĵajn tinkturojn el la komercejoj de la okcidenta mondo, sed la orientuloj ankoraŭ fabrikas ilin. Estas dirite, ke la produktoj de la laborado de S-ino. Hart posedas brilecon netroveblan en analinaj tinkturoj. La brilaj vegetaĵaj tinkturoj esti-

uzataj de Ĥinoj kaj aliaj orientuloj por la fabrikaĵoj en iliaj temploj kaj ili retenis sian kvaliton dum centoj da jaroj. La popoloj en la montaj regionoj de Skotlando, kaj de Svedujo kaj Centra Rusujo fabrikas siajn proprajn vegetaĵajn tinkturojn sed menui ĝis nun sukcesis ekstrakti nuancojn kaj brilojn similajn al tiuj faritaj de S-ino. Hart. El la herbarbo, kiun la registaro rigardas kiel malutilaĵon, la plej belaj nuancoj de flavo estas akiritaj.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 4a de novembro ni ricevis la jenajn sumojn:

W. L. Waterman, 4/6; W. H. King, 5/6; M. T. Steitz, 4/6; M. Martinek, 10/-; W. L. Edmanson, 10/-; M. Holdensen, 4/6; J. Rogers, 8/-; S. R. Franks, 10/-; P. Dean, 10/-; C. H. Parker, 5/-; G. Benson, 5/-; K. Madrigalo, 9/-; — Dunleavy, 4/6; — Ostler, 4/6; — Widdowson, 4/6; — Dodd, 4/6.

Sro. A. R. Cohen is the Australian agent for BES-a Adresaro. To register your name and receive the 5th Edition, send 1/6 at once, c/o Box 731, Melbourne.

Inĝ Leopold Berger, Moravany (Boh.), Ĉeĥoslovakujo, interŝanĝas poŝtkartojn ilustritajn, poŝtmarkojn, esperantaĵojn, prefere kun ekster-eŭropanoj.

„BES-a Adresaro de Esperantistoj el Ĉiuj landoj," 4-a eld (1922/23), enhavas ankaŭ portretojn de Esperantistoj.—Belaspekta broŝuro, 86-paĝa, necesega por ĉiuj!—Prezo lŝ. 3p. (1.50 Fsv).—Prospekton, sendas senpage la eldonanto: Bohema Esperanto-Servo, Moravany (Boh.), Ĉeĥoslovakujo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

“THE RAINBOW,” Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers,
Little Collins Street, Melbourne,
By The Imperial Press, Printers, 395 Elizabeth Street, Melbourne.